[noto] fonto: "Budhana Kuriero", n-ro 2521-1, 1978 (B.E. 2521)

# *Kial mi estas budhano?*

**anonima**

1

Budho neniam pretendis esti supera estulo nek proklamis, ke ia diaĵo donis al li misterajn revelaciojn. Pro tio ĉiu homo povas akcepti la Budhan instruon kaj sekvi lian vojon sen ia ajn kredo al dogmoj, kiuj estas nekompreneblaj kaj kontraŭdiras naturajn leĝojn. Budho neniam kaŝiĝis malantaŭ transcendaj misterioj; li estis brava homo, honesta kaj rekta.

2

Budho tute ne promesis al siaj anoj ĉielajn plezurojn aŭ rekompencojn nek promesis beatecon al tiuj, kiuj (blinde) kredus lin. Laŭ Budho religio ne estas negoco, sed vojo al la iluminiĝo. Li ne bezonis blinde kredantan anaron, sed homojn memstare pensantajn.

3

Kaj jen unika okazo en la tuta historio de la religio: Li havis la kuraĝon inviti kritikon, kaj li plue submetis sian instruon al la racio de sia anaro; per tio li stimulis la memestimon kiel bazon de la spirita kreskado kaj de libereco.

4

Stimulante la memestimon, li sukcesplene kapablis instrui la estimon vid-al-vide de aliaj (t.e. la toleremon). - Ek de ĝia komenco la Budha instruo estis tolerema, ne pro malforteco kaj indiferenteco, sed sekve de ĝia esenca principo de spirita libero. Ekzistas du specoj de toleremo: negativa, kiu baziĝas je malforteco aŭ spirita apatio (se iu diras '... estas bone, tia estas tio, ne eblas ŝanĝi ion', malsupren rigardante al la aliuloj kiel al pekantoj kaj paganoj); la dua estas pozitiva, baziĝante sur la scio de la homa psiko kaj naskite el la deziro kompreni la aliulojn.

5

La Budha instruo kaj ĝia moralo ne limiĝas al la homaro, sed inkluzivas ĉiujn vivajn estulojn. Ĉiuj vegetaĵoj kaj bestoj esence samiĝas al la homoj, escepte ke ĝiaj formoj varias. Pro tio ni ne limigu niajn moralajn sentojn al la kunhomoj, sed etendu ilin al ĉiuj vivaj estuloj. - La Budha instruo kaj la kristismo similas unu la alian laŭ

multaj rilatoj, kaj pro tio nenia malamikeco kresku; tamen la ideo de la unueco de ĉiuj estaĵoj nur troviĝas ĉe la budhismo.

6

La universaleco de la Dharmo valoras ne nur rilate la moralon kaj la etikon, sed ĝi same inkluzivas la naturajn leĝojn. Ne ekzistas transcenda leĝo aŭ privilegio por certa klaso de estuloj, nek troviĝas loko por la despotismo aŭ kompato de ia ajn kreinto. La Dharmo estas la kosma ordo, kiu aplikiĝas kiel por la homaro tiel por la universo kaj sekve ligas la individuon kun la tuto.

7

La universaleco de la budhismo malebligas dogmismon kaj malliberalan pensmanieron. Ne ekzistas absoluta morala leĝo, kiu dispartigas la mondon en "bonan" kaj "malbonan", aŭ kiu postulas ian faron aŭ nefaron. Budhana moralo baziĝas je libero, t.e. individua evoluo; por tio ĝi estas relativa. Ĉar se ni estus subigitaj al la perfoto aŭ la reguloj de iu aganto ekster ni, morala aŭ etika leĝo ne necesus. Supozante kreinton aŭ rganton de tiu mondo, kiamaniere ni povus esti respondecaj pri niaj malperfektaĵoj, ĉar ni estus liaj kreitaĵoj? Aŭ se ni estus kreitaj tiel malfortaj, ke ni ne kapablus kontraŭstari la malbonon?

8

La budhano komprenis la relativecon de la morala leĝo, kaj pro tio li neniam malestimas la aliulojn kiel "pekulojn". La Budha instruo ne konas ian "pekon" kaj nenio aŭ neniu estas potenciale malbona. Ekzistas nur pli aŭ malpli da nescio. Ĉies agado korespondas al la fazo de sia individua evoluo. Kio aperas bona por unu, tion aliulo prijuĝas malbona. Ju pli elvolvinta estas ia individuo, des pli grandaj estas liaj devoj, ne liaj privilegioj. Do la budhano neniam prijuĝas la kunhomojn, sed li limiĝas al la plenumo de siaj devoj; li postulas pli de si mem ol de la aliuloj. Li pli ŝatas kompreni la kunhomojn ol trudi siajn moralajn ideojn al ili.

9

Kiel la ideo de ia peko estas nekonata al li, tiel li ne kredas ian eternan kondamnon. Ĉielo kaj infero estas **en ni**, kaj la ebleco de la saviĝo malfermiĝas al ĉiuj vivaj estuloj.

10

La Budha instruo ne vekas ĉe la sekvantoj fantaziajn esperojn al paradizo en ia transa mondo, sed ĝi gvidas al la liberiĝo, saviĝo atingeblaj en tiu ĉi mondo. Antaŭguston ni povas atingi per la meditado.

11

La budhana meditadsistemo, baziĝante je la plej funda kono de la psikologio, ne nur montras la celon atingeblan, sed ĝi samtempe prezentas la praktikan vojon al ties efektivigo.

12

La ideo de Karmo unuigas justecon kaj memdecidon. Ĝi donas gravan signifon al la vivo de la unuopulo, ligante lin kiel al la pasinteco tiel al la estonteco. Karmo estas la bazo de la homa digno, kiu liberigas la homaron el de la arbitracio de ia ekstera forto.

13

Kontraŭ ĉiuj aliaj religioj la Budha instruo tute akordiĝas kun la scienco. Ĝi eĉ stimulas la spiriton de la esplorado sen timi la rezltojn, ĉar la Budha instruo sin apogas nur sur la vero, la plej forta armilo, kiu, post la malapero de la dogmoj, konkeros la mondon.

* * * * *

El ĉiuj eminentaj religifondintoj Budho estas la unika, kiu stimulis la esplorspiriton de siaj disĉiploj kaj kiu avertis ilin, ke ili ne blinde akceptu lian instruon. Pro tio ne estas troigo konstati, ke la Budha instruo estas la unika religio, kiu meritas la atributon **moderna** aŭ pli bone **sentempa**. Sentempa, ĉar ĝi validas ĉiam kaj estas aplikebla al ĉiuj kondiĉoj kaj cirkonstancoj en ĉiuj medioj dank' al ĝia principo de la realo.